



# GAZETO



# HISPANA

ĜSPERANTA MONATA REVUO  
OFICIALA ORGANO DE H. S. p. p. E.

— REDAKCIO —

DIREKTANTO: J. GARZÓN RUIZ

Ĉefaj kunlaborantoj: *E. Cano, I. Casas, R. Codorniu, C. Escobés, M. Esteban, E. González de Escandón, J. Hedley-Ince, V. Inglada, P. Linares, A. López Villanueva, J. Perogordo, F. Redondo, F. Soler.*

Sidejo de la Administrao: M. TORRERO, 10.—San Fernando (Cádiz)

ABONPREZO—1'20 SM. (3 PESETOJ) JARE

TARIFO POR ANONCOJ

1½ pago . . . . .	4 Sm. (10 pst.)
1¼ » . . . . .	2 » (5 » )
1⅓ » . . . . .	1 » (2'50 » )
Malgrandaj anoneoj per korespondado . . . . .	0'20 » (0'50 » )

KONTO ĈE ĈEBANKO ESPERANTISTA



# Esperantaj Gazetoj

OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA, organo de la Lingva Komitato kaj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj. Jarabono: fr. 5 (sm. 2). Centra Oficejo. 31, rue de Clichy, Paris.

THE BRITISH ESPERANTIST, oficiala monata organo de B. E. A. Jarabono: ŝ. 3 (f. 4). 1'60 sm. Ĉe la Sekretario de la B. E. A., 133-136, Hig Holborn, London W. C.

LA SPRITULO, monata internacia gazeto por ŝerco, humoro kaj satiro. Ĉe Richard Bresch. Tolkewitzerstrato 20,1 (Germanujo). — Jare: mk. 2'50 (sm. 1'20).

DANUBO, internacia gazeto redaktata nur en Esperanto, eliranta post la 15 de ĉiu monato. Strato L. C. Bratianu, 5. Bucuresti (Rumanujo). — Jare: 3 50 fr. (1'40 sm.)

NOVA SENTO, organo de la Vaska Esperantistaro. Aperas ĉiunmonate. Strato Jardines, 7, Bilbao (Hispanujo). — Jare: En Fremdlando, 2'25 pesetoj (0'90 sm.); en Hispanujo, 1'75 pesetoj (0'70 sm.)

JUNA ESPERANTISTO, monata Gazeto Beletristika por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj. Jarabono: 2'50 fr. (1 sm.); Ambaŭ kune: 6'25 fr. (sm. 2'50).

Preso Esperantista Societo, 33, Rue Lacepede. — Paris.

LA REVUO, internacia monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado de D-ro L. Zamenhof; ĉe Hachette kaj K.°, 79. Bd. St. Germain, Paris. Jare (francujo), fr. 6; eksterfrancujo, fr. 7 (sm. 2'75).

LA ONDO DE ESPERANTO, ĉiunmonata regule-perioda organo de rusaj esperantistoj. Jara abonpago. 2 rubl. (sm. 2'12). Tverskaja, 26. Moskvo, Rusujo.

TUTMONDA ESPERO, organo de la kataluna esperantistaro. — Jarabono 3 fr. (1'20 sm.) Ekster Hispanujo. 4 fr. (1'60 sm.) Tallers, 81. — Barcelono.

LE MONDE ESPERANTISTE, Monata Revuo en Franca kaj Esperanta lingvoj. — Red. Adm. 3, Rue Sophie-Germain. Paris. — Jare 0 80 sm. (fr. 2).

KATALUNA ESPERANTISTO, monata Gazeto, oficiala organo de la «Kataluna Esperantista Federacio». Gracia, 12, Sabadell (Hispanujo). Jarabono: 3 fr. (sm. 1'20).

GERMANA ESPERANTISTO, monata gazeto por la vastigado de la lingvo Esperanto. Jara abonprezo, 3 m. (1'50 sm.) en ĉiuj landoj; prova abono por 6 monatoj, 1'50 m. (sm. 0'75). Esperanto Verlag Moller & Borel, Berlin SW. 58, Lindenstr., 18-19.

LA MOVADO, monata gazeto por Propagando, Informo kaj Komercio. — Abonoj: Francujo, 1 jaro, fr. 2 Alilando, 1 jaro, fr. 2'75 (1'10 sm.) — 31, B.<sup>d</sup> S.<sup>t</sup> Marcel, Paris.

ESPERANTO, duonmonata internacia gazeto.

Organo de Universala Esperanto Asocio. Unu numero: 15 ctm. (6 sd.) jara abono 4 Fr. (Sm. 160.)

Direkcio: H. Hodler, 8, rue Bo-vy-Lysberg, Genève (Svisujo).



ESPERANTA MONATA REVUO

Oficiala organo de Hispana Societo p. p. Esperanto  
kaj de la aliĝintaj Grupoj.

— REDAKCIO —

DIREKTANTO: J. GARZÓN RUIZ

<sup>A</sup>Cefaj kunlaborantoj: *E. Cano, I. Casas, R. Codorniu, C. Escobés, M. Esteban, E. González de Escandón, J. Hedley-Ince, V. Inglada, P. Linares, A. López Villanueva, J. Perogordo, F. Redondo, F. Soler.*

ABONPREZO—1'20 SM. (3 PESETOJ) JARE

Sidejo de la Adminstraco: M. TORRERO, 10.—San Fernando (Cádiz)

1.<sup>a</sup> Jaro.

Februaro de 1911.<sup>a</sup>

Numero 2.<sup>a</sup>

**ENHAVO:** Memorajho.—La Karnaval.—El Carnaval.—Crònica.—  
Oficialaj Sciigoj.—La Kapitano Veneno.—Bibliografio.—Anoncoj.

## Memorajho

(En la 50<sup>a</sup> datreveno de nia milito che Afriko)

La ora plumo de tiu fama hispano, kiu, same kiel la senmorta Cervantes, estis soldato el la patrujo kaj klera majstro por la literaturo, de tiu menvolvulo el la korpuso de O'Donnell, kiu sekvis paŝo post paŝo la glora serio da heroaĵoj de abnegacioj kaj de epopeaj triunfoj de la hispana mili-

tistaro, dum la milito ĉe Afriko, en 1850<sup>a</sup>-1860<sup>a</sup>; la brilanta, varmiga kaj viglega plumo de la eminenta verkisto Petro Antonjo de Alarkon', skulptis, per la diamantaj iloj el sia inspiro kaj genio, detalan historion de tiu ĉeno el oraj heroaĵoj de nia mara kaj surtera armeoj, sur la paĝoj de tiu rimarkinda libro, neniam sufiĉe legita nek laŭdita, kiun ĝia aŭtoro nomis *Diario de un testigo de la guerra de Africa* (Taglibro de alestanto ĉe la Afrika milito).

En tiu libro, oni rakontas la suferojn, la penegadojn, la mirigantajn okazintaĵojn, en fortika kaj sana disciplino, homamaj sentoj kaj edifa, amega kulto al la standardo de nia militistaro, dum tiu brutaj, kruela, sangverŝa, obstinega milito, daŭrinta unu jaron, inter civilizacio kaj barbereco, inter lumo kaj ombro, simboligita per la glora hispana standardo kaj la ruĝa elpendaĵo de la Mahometanoj.

Nune plenumiĝas la 50<sup>a</sup> datreveno de l'triunfa kronado pri tiu memoriginda milito, pri la Batalo de Tetuan', pri la elpreno, per niaj armeoj, de tiu belega Afrika urbo, kiu rememoras, pro ĝiaj minaretoj, ĝiaj oranĝarbejoj kaj ĝia rivero, la vizio de Ĥiralda, oranĝoflora arbaro haj bluarĝenta akvo el Guadalkivir'o, de nia nekomparebla Seviljo.

La tagon 4<sup>a</sup> de Februaro de 1860<sup>a</sup>, oni malelstarigis el la fortikaĵo de la Sankta Urbo la elpendaĵon, kiu simboligis la sangon kaj la barbereco, la sovaĝecon kaj la kruelecon, elstarigante, en ĝia loko nian karegan standardon, el kies sanktegaĵoj, glortriunfaj flugante, skuitaj per vento, disigis tra tiu lando la fruktodonaĵoj kaj bonfarantaĵojn ĝermojn de kultureco, homameco kaj Natura juro.

Hodiaŭ, tributante sentimentalajn oferdonojn al la memoro de tiuj heroaj kaj de tiuj martiroj, mi ankaŭ rememoras tiujn kuraĝajn Hispanidojn, kiuj antaŭ du jaroj, en 1909<sup>a</sup>, disverŝis sian sangon ĉe Riff, oferdonante ĝin, por ke sorbigante la krutajn rokojn de la *Lupa krutvaletoj*, kaj la sekajn ebenaĵojn de Tardix, floru, el tiel benata semo, la ĝermoj de Paco, Frateco kaj Amo; ĉar rasa kaj historia simileco kunligas nin.

Esperanto persekutas la regadon de tiuj samaj sentoj: tial, mi petas al la Esperantistoj, ke ili oferdonu kompatan memoraĵon, gloran oferon, laŭran branĉeton, por tiuj soldatoj, kiuj ĉeestis ĉe Afriko dum 1860<sup>a</sup>-1909<sup>a</sup> jaroj.

ALFREDO ROCA.

(El la R. Hisp-Amer. Akademio de Cádiz)

## KARNAVALO

Ni alvenis en tagojn de vera frenececo. Ĉie ni aŭdas voĉojn, kiuj diras al ĉiuj preterpasantoj: Ĉu vi min konas? Ĉu vi min konas? Ĉi-tiu estas plej ĉarma trajto de Karnavalo.

Mi ne povas deteni la ridon, aŭdante tiujn naivajn, infanajn vortojn. Ĉu vi min konas..! Kiel vi volas, ke mi konu vin, pedanta maskitineto, kiam vi surportas kovrita la vizaĝon? Kiel vi volas, ke mi konu vin, se eĉ kiam vi estus sen vizaĝmasko, mi vin ne konus? Ĉu eble vi opiniis, ke l'arto pri konado de personoj estas facila afero kaj atingebla por ĉiuj? Kun masko aŭ sen masko, mi humile konfesas, ke mi konas nenium, ke mi ĉiutage estas pli konvinkata pri mia nesciado, kaj ke apenaŭ mi konas min men.

La maskitinetoj estas tre belaj, iuj el ili, sed ankaŭ ili estas tre idiotaj. Ĉar, kiu subitpensas demandi al la unua preterpasanto «ĉu vi min konas, ĉu vi min konas...?» Tiel ĉi neniu konas sin, ĉiuj estas ĉiutage maskigitaj, kaj ĉiuj ruz trompas sin men. Miaflanke mi deklaras, ke ĉiafoje mi estas pli mallerta pri konarto: mi konas nenium, kaj la viroj tiel, kiel la virinoj, rezultas por mi veraj enigmoj.

Estus preskaŭ nenio, se oni konus la personojn! La homa gento estas

## CARNAVAL

Llegamos á los días de verdadera locura. En todas partes oímos voces que dicen á todos los que pasan: ¿Me conoces, me conoces?... Este es el rasgo más gracioso del Carnaval.

No puedo contener la risa cuando escucho esas candorosas, infantiles palabras. ¿Me conoces...! ¿Cómo quieres que te conozca, pedante mascarita, si llevas tapado el rostro? ¿Cómo quieres que te conozca, si aun estando sin antifaz no te conocería? ¿Por ventura has creído que el arte de conocer á las personas es cosa fácil y al alcance de todos? Con máscara y sin máscara yo humildemente confieso que no conozco á nadie, que cada día estoy más convencido de mi ignorancia, y que apenas me conozco á mí mismo.

Las mascaritas son muy lindas, algunas de ellas, pero también son muy idiotas. Porque, ¿á quién se le ocurre preguntar al primero que pasa «¿me conoces, me conoces...?»

Aquí ninguno nos conocemos, todos somos unos cotidianos enmascarados, y todos nos engañamos ladinamente. Por mi parte declaro que cada vez soy más torpe en el arte de conocer: yo no conozco á nadie, y los hombres, así como las mujeres, me resultan verdaderos enigmas

¡Ahí sería casi nada, el conocer á las personas. El género humano es

profunda kaŝema kaj mensogema abismo; kaj mi kredas ne multe riski dirante, ke la ekzistado de l'homa speco sin bazas precipe sur menzogo. Se la trompo ne ekzistus, eble ni ne ekzistus nune. Viro trompas virinon, kaj virino trompas viron; infano maljunulon, kaj maljunulo infanon... Ni ĉiuj nin trompas kiel eble plej bone, kaj tiel ni pasigas la vivon.

Se ĉiutaga masko ne ekzistus, se la trompo malaperus, la kunligado de aferoj detruigus. La mensogo estas ia reto, per pero de kiu ebligas la kunvivo de unuj kun aliaj. Se tiu trompreto ne estus teksiginta, kio estus pri ni? La komercisto povus nek aĉeti nek vendi, ĉar li eksklusive vivas per la trompado kaj per la malico; la popoloj havus nek registaron, nek reĝojn, nek prezidantojn, ĉar la politiko estas antonomasie la trompo; pri l'amo... Se ne estus mensogo, kiamaniere sin kunligus la estaĵoj el ambaŭ seksoj, pro tio, ke la fundamento de l'amo estas la trompo? Unuvorte: se vi ekzilas la trompon, la maskon, la kaŝemon, vi estus farinta nebla la vivon mem. Tio, kion mi diras, estas iom kruela kaj malgaja, sed estas vera.

Ĉu mi diras vera...? Do mi devos korekti, ĉar mi jam ne scias tion,

un hondo abismo de disimulo y de mentira; y creo no aventurar mucho si digo que la existencia del género humano se basa principalmente en la mentira. Si no existiese el engaño, á estas horas es probable que no existiéramos. El hombre engaña á la mujer, y la mujer engaña al hombre; el niño al viejo y el viejo al niño... Nos engañamos todos de la mejor manera posible, y así vamos tirando de la vida.

Si no existiese la máscara cotidiana, si el engaño desapareciese, la trabazón de las cosas se vendría abajo. La mentira es una especie de red, mediante la cual llega á ser posible la convivencia de unos con otros. Si no se hubiera tejido esa red de engaño, ¿qué sería de nosotros? El comerciante no podría comprar ni vender, porque vive exclusivamente del engaño y de la malicia; los pueblos no tendrían gobierno, ni reyes, ni presidentes, porque la política es el engaño por antonomasia; en cuanto al amor... Si no hubiese mentira, ¿cómo llegarían á unirse los seres de ambos sexos si el fundamento del amor es el engaño? En una palabra: si desterrais el engaño, la máscara, el disimulo, habreis hecho imposible la misma vida. Esto que digo es un tanto cruel y triste, pero es verdad.

¿He dicho verdad..? Pues tendré que rectificar, porque yo no sé ya

kio estas mensoga, kio estas ia. Mi nur scias, ke la mondo estas mal-simpla aĵo el amuzaj aferoj, unuj malbelaj aliaj belaj, unuj amindaj aliaj terurigaj, kaj ke ĝuste el tiel amuza amalgamaĵo devenas la harmonio, iom groteska, de tiu malnobla mondo.

Tamen, kiel bela estas la sincereco! Kaj, kiom mi amas la spiritojn klarajn, kuraĝajn, sincerajn...! Maskitineto mia, se vi estas bela kaj estas bona, kial vi ne demetas la vizaĝmaskon? La beleco ne bezonas sin kaŝi nek la boneco bezonas mensogi.

TRADUKIS J. GRZON.

lo que es verdad, lo que es mentira ni lo que es nada: Sólo sé que el mundo es un compuesto de cosas entretenidas, unas feas y otras bonitas, unas amables y otras horribles, y que precisamente de tan entretenida amalgama surge la armonía, un tanto grotesca, de este bajo mundo.

Sin embargo, ¡qué hermosa es la sinceridad! Y ¡cuánto amo yo los espíritus claros, fuertes, sinceros...! Mascarita mía, si eres bella y eres buena, ¿por qué no te quitas el antifaz? La belleza no necesita esconderse, ni la bondad necesita mentir.

J. M. SALAVERRIA.

## Crónica

**Alemania.**—El día 30 de Enero último, tuvo lugar en Görlitz una hermosa representación teatral esperantista, en el local del «Reichshallentheater», por los señores Schwarz. El teatro, que estaba profusamente adornado con banderas esperantistas, se vió completamente ocupado por un público ávido de saborear las bellezas del nuevo género; con que se le brindaba. Todos los artistas llevaban prendida la verde estrella del Esperanto; resultando, por consiguiente, un buen medio de propaganda para nuestra causa.

También la Sección esperantista de los estudiantes de Königsberg preparó, el 21 de Enero, una representación vespertina en «Artushof», á la que concurrieron próximamente 150 personas. Después del prólogo, dicho en Esperanto por una estudiante, se cantó y declamó en Esperanto y alemán; y á esto siguió un baile, que duró hasta la madrugada.

En Krakovo, cerca de Magdeburgo, se celebró el día 11 de dicho mes una reunión magna, convocada por el Grupo local, que había hecho fijar grandes anuncios, ofreciendo enseñar la nueva lengua á los más torpes, en pocas horas. El Dr. Homz Schmitz, de Colonia, encargado de la conferencia, tuvo que permanecer de pié, en el balcón de la Casa Ayuntamiento, donde se celebraba el acto, por la enorme cantidad de público, que llenaba el salón y aún la plaza. Apesar del tiempo frío, que se dejaba sentir, las palabras del orador enardecieron al auditorio, cuyo número podía calcularse en

5.000 personas, de las cuales 1.111 se inscribieron para seguir el Curso de Esperanto, pagando inmediatamente sus honorarios, á razón de 10 marcos (12,50 pesetas), incluso los libros. En vista del gran éxito alcanzado, el alcalde ofreció construir un local aparte para los Cursos; porque ninguno de los actuales sería suficiente. Sin embargo, los jefes del Grupo quieren comenzar enseguida las conferencias, y hasta se habla de fundar una nueva revista, «Krakova Lumo», que aparecerá muy pronto, con edición diaria.

Se han abierto nuevos Cursos, con gran número de alumnos, en Braunschweig, Breslau, Bromberg, Charlottenburg, Daurig, Dresden, Frankfurt, Godesberg, Hamburg-Altona, Böttbus Ludwigsburg Mühlhausen, St. Ingbert, Schkeidnitz, Wurzen y Zabze.

Todos los esperantistas de Berlín han sido invitados á participar de la fiesta de invierno preparada por el Grupo, en Schloss Weissensee, el 18 del mes actual. El Sr. Bohredt, vicepresidente de la E. G. B. hará el discurso principal, y luego tendrán lugar otros discursos, representación teatral, lotería y baile.

**Brasil.**—Una fábrica de cigarros en el Estado de S. Paulo ha creado la nueva marca «Cigarros-Esperanto», que contribuirá á la propaganda de la idea en aquel país. También son de esperar muy beneficiosos resultados con la edición hecha por la Librería Salesiana de S. Paulo, de una hoja estilo de las claves Ĉefeĉ, que contienen toda la Gramática, con ejemplos y explicaciones, un Vocabulario y gran número de Ejercicios. Nuevos cursos se han fundado en los Estados Alagoas y Minas Geraes.

**Estados-Unidos.**—En Washington, D. C. la Federación del Distrito de Colombia ha elegido como presidente al señor Kard F. Kellerman, del Departamento de Agricultura. Este, en su discurso, saludando á la Federación, ha expresado que es uno de los científicos que, hace algunos años, solicitó tomar parte de la Comisión de las Academias, cuyos miembros intentaron auxiliar con ella al Esperanto, y que nunca aprobó la manera de conducirse los idistas, á pesar de haber estos afirmado lo contrario, abusando descaradamente de su firma. Se han abierto nuevos Cursos en Portland Maine; Montpelier, Vermont; Sta. Johnsburs, Vermont; Boston, Mass; Worcester, Mass; Eas Bridgewater, Mass; Rockville, Conn; Brooklyn, New-York; New-York-City; Ithaca, New-York; Pittsburgh, Pa; Baltimore, Maryland; Clevelad, Ohio; Aurora, Nebraska; Lewis, Kansas; Amarillo, Texas; Dartmouth, Canadá y otros.

**Francia.**—Por iniciativa de M.M. A. Willmy Ch. Leboucq, y á solicitud de Dr. Godard, Diputado del Rône, se ha formado un Grupo Esperantista en la Cámara de los Diputados. El primer acuerdo ha sido poner sobre el tapete el proyecto de 1907, que suscribieron 70 Diputados, segun el cual el estudio del Esperanto sería comprendido en los programas de la Enseñanza pública, aunque con carácter facultativo. Los concursantes á cualquier lengua viva podrán alegar el conocimiento de aquel idioma, como suplementario, y se les tendrá en cuenta para su calificación correspondiente.

Los alumnos del Curso Superior de Esperanto, en el Liceo de St. Omer



han organizado una imitación del Congreso Universal, cuya primera reunión tuvo lugar el día 8 de Noviembre último y la segunda el 15 del mismo mes. A él concurrieron varios Delegados, de Moresnet, Louches (capital de Turquía), Anvers (Bélgica), Dresden, Frankfurt, Japón, Inglaterra, y hasta de la Luna; el cual, bajo pseudónimo de S<sup>o</sup> Mensogemulo, dió algunos informes acerca de dicho planeta que, á pesar de las afirmaciones de los hombres de ciencia de la Tierra, contiene muchos habitantes, están, desde hace tiempo, más civilizados que nosotros y han abandonado los automóviles, aeroplanos, etc., usando ahora unas alas, como las de los pájaros; hablan una sola lengua, naturalmente el Esperanto, que vino al cerebro del Dr. Zamenhof por virtud del soplo eléctrico de un lunario. El Delegado saludó al Congreso y prometió que, cuando el Esperanto sea aceptado en toda la Tierra, él volverá y hará conocer un aparato especial por el cual los Terranos podrán visitar á sus compañeros de la Luna. Le contestó el Presidente, Mr. Aunebicque, delegado de Grecia, el cual cerró el Congreso y expresó el deseo de que los congresistas volvieran pronto á verse.

Con motivo de la Ley votada en la Isla de Samos (Turquía) de que ya dimos cuenta en el número anterior, haciendo obligatoria la enseñanza del Esperanto en las escuelas de la isla, Mr. Emile Houbart, redactor *La Movado* hizo una visita al señor Embajador de Turquía en París, al efecto de preguntarle su opinión acerca de este asunto y sobre el Esperanto en general.

S. E. se excusó de contestar categóricamente, por su edad avanzada. Sobre todo, dijo, es cuestión que interesa á las jóvenes generaciones, á quienes seguramente prestará muy útiles servicios; siendo de esperar que tal idioma se desenvolverá más y más en todos los pueblos. Como llegara la hora del correo y éste no admitía prórrogas, hubo de terminarse aquí la conferencia, con menos resultado que la celebrada con nuestro Embajador, referida en la Crónica pasada.

En Grenoble, gracias á los esfuerzos de M. M. Roy, Director de Escuela; Gazin, Inspector de Academia; y Lajonchère, Inspector primario, es enseñado el Esperanto con aprobación del Concejo Municipal, en las Escuelas Superiores de niños y niñas y en las Escuelas elementales, existiendo también en curso para profesores é institutrices.

Grenoble marcha triunfalmente por el camino que Sille, donde el Esperanto es enseñado oficialmente desde 1907. Lo mismo ocurre en Bordeaux, por M. Daire, profesor del Liceo de dicha ciudad. Lille, Bordeaux, Grenoble, bien pronto Chorbourn, ... puede decirse que nuestro idioma auxiliar está hoy esparcido por toda la Francia.

**Gran Bretaña.**—El Club de Londres improvisó un concierto el día 6 de Enero último, en el que se representó «La Strumpoj de la Baronino», provocando la risa al auditorio, que era muy numeroso. Luego cantó, sin auxilio del piano, en los idiomas italiano, polaco, francés, árabe y alemán, el Sr. Rudolf Spotte, traduciendo algunos cantos al idioma internacional. Este señor ha realizado muchos viajes, en los que ha estudiado los cantos de los

países recorridos; y explicó muchas ocurrencias acaecidas en los mismos, que fueron muy interesantes.

El Grupo de Barrow ha probado un método original de propaganda, por medio de hojas voladoras, con texto en Esperanto, bajo el cual aparecían anuncios de librerías, vendedores de objetos esperantistas, como claves éfecé, libros de estudio y de lectura, etc. Estos mismos librerías repartieron anuncios análogos, durante el verano último, en los libros y revistas, en número de hasta 3.000 circulares.

El Grupo de Manchester ha abierto el nuevo año el día 5 de Enero, con una reunión, á la que asistieron más de 100 congresistas, pronunciando un buen discurso acerca del Esperanto, el redactor jefe de la *Manchester City News*; al que siguieron cantos, juegos de carta y conversación muy entretendida.

En Portsmouth se ha establecido un nuevo Grupo, y han comenzado clases de Esperanto en el Instituto Lake-road, á solicitud de los mismos estudiantes. El periódico *Wigan Observer* anuncia también que el Grupo Esperantista local ha establecido dos nuevos cursos, uno para los principiantes y otro preparatorio para los exámenes oficiales de la Lancashire y Cheshire Unión de los Institutos, la Unión Nacional de Profesores y la Brita Esperanto Asocio (B. E. A.)

**Perú.**—En el Senado de este País ha presentado el honorable senador Sr. César del Río, el siguiente Proyecto de Ley: «Considerando que es necesario fomentar el desarrollo comercial é industrial del país, mediante la difusión de un idioma de carácter mundial. *Artículo único.*—Inclúyase en los programas de la Sección comercial del Colegio de Nuestra Señora de Guadalupe y en los demás de instrucción media, donde se haya establecido ó se establezca en lo sucesivo igual Sección, el curso de Esperanto. Admitido á discusión, pasó á la Comisión respectiva, para que lo estudie y dictamine.

**Portugal.**—En el mes último se han abierto dos cursos de Esperanto en Lisboa; uno elemental y otro complementario.

**Rumania.**—El 29 de Diciembre último, la Sociedad Esperantista Rumana, por motivo de ser el cumpleaños de S. M. la Reina Isabel, su Alta Protectora, le envió un telegrama de felicitación, al que ésta contestó con otro de agradecimiento. Al Curso esperantista de la Sociedad General de Dependientes de Comercio, en la escuela «General Adrian» de Bukarestk, concurren actualmente 63 jóvenes, bajo la dirección del Dr. Robin, presidente de la «Rumana Esperantista Societo». Se han abierto nuevos Cursos, para los socios del Gimnasio y para los barberos. En la Universidad, también se ha constituido un nuevo Grupo de estudiantes. En Jâsi, un buen número de éstos siguen el Curso de Esperanto, que se explica públicamente, en la escuela «Lambrior». En Paškani se acaba de fundar otro Grupo.

## Oficialaj Scigoj

La unuan de la venonta Marto komencos kurso pri instruado de Esperanto en «Esperantista Grupo Dolorense», ĉe lernejo, kiun estras S<sup>a</sup> Francisco Miras (strato Tomás Blancas.—Los Dolores=Cartagena). La Direkta Komitato de tiu Grupo estas nun jene: Prezidanto, S<sup>o</sup> Camilo Molina.—Kalkulista Sekretario, S<sup>o</sup> Francisco Miras.—Kasisto, S<sup>o</sup> Gines Nieto.—Bibliotekisto, S<sup>o</sup> Emilio Nieto.—Voĉdonantoj. S<sup>o</sup> Anselmo Sánchez, José Antonio González García kaj Fulgencio Cerezuela = Tiu-ĉi Grupo estis fondata de sia nuna Prezidanto, en Octobro de 1909<sup>a</sup> kaj la Regularo, per kiu ĝi sin regas, aprokata de la Provincestro, en 27<sup>a</sup> de Novembro de tiu jaro mem.

S<sup>o</sup> Cesareo Huecas, el la Gerona Grupo *Amo kaj Espero*, verkis kaj publikigis en la tiea ĵurnalo «El Norte», bonegan artikolon pri la facileco de l'Esperanto por la Hispanoj, kiun ni plezure tralegis. Tiamniere oni propagandas plibone ol alia, ĉar ĉiuj legantoj restas nepre konvinkitaj, ke nia lingvo internacia estas plej facila kaj studinda ol ĉiuj; bone atingebla por iu ajn persono, nur per malgranda volforto.

Ankaŭ S<sup>o</sup> Romano Ayza, eksprezidanto de nia Hispana Societo, verkis en *La Correspondencia de España* gravan artikolon pri Internacieco kaj Esperanta afero, dirante, krom aliajn veraĵojn, ke lingvo internacia estas bezoniga por fini Babelan konfuzadon en ĉiu Konferenco, nome tiu de Portsmouth, en kiu Roosevelt promesis sian interhelpon al Rusujo por fini la militon. M. Witte parolis ruse, kaj liaj paroloj estis traduktataj angle, de M. Naboukof; la barono Komura parolis japane, kaj M. Adatei tradukis france la aferon. Entute, kvar lingvoj, por permesi al du plenpotenculoj interparoli kaj interkompreni reciproke. Je la fino, demandas S<sup>o</sup> Ayza, ĉu Esperanto estas la lasta vorto pri la internacia lingvo; respondante, ke ne estas saĝe kaj ke estus fanfarone certigi ĝin; sed oni povas certigi ke alia elpensota idiomo sin apogos sur la du principoj, nome, maksimumo de internacieco pri ĝiaj radikoj, kaj nesangebleco pri ĝiaj gramatikaj elementoj; kies kondiĉoj plenumas Esperanto. Ĉu oni devas atendi, por lerni tiun idiomon, ĝis kia moni elpensos alian pli perfektan? Tion oni devas respondi per alia demando, kiu taŭgas kiel ringo sur fingro: Ĉu ni neuzos vagonaron, kiel rimedo por vojaĝi, pro tio, ke estas proksima la elpenso pri aerveturado? Ni estu kontenta havi Esperaton, kiu jam estas pruvinta en Kongresoj, en scienco, en komerco, en industrio kaj eĉ en literaturo.

*Novaj anoj.*—Dum la monato januaro oni enskribis la jenajn novajn membrojn: 1756, D. Francisco Mugica, Madrid.—1766, D. Alfredo Pastor, Pego (Alicante).—1767, D. Juan García, id.—1768, D. Román Pastor, id.—1769, D. José Calatayud, id.—1770, D. Bernardino Sastre, id.—1771, Don Faustino Calatayud, id.—D. Leocricio Pascual, id.—1773, D. Pascual Martí.

—1774, D. Cristeto Rodríguez, Córdoba. —1775, D. Enrique Villegas, id.—1776, D. Antonio de Toro, id.—1777, D. Mariano Amo, id.—1778, D. Fernando Montalvo, id.—1779.—D. José de Tapia, id.—1780, D. Luis Marivela, id.—1781, D.<sup>a</sup> Rosario García, id.—1782, D. Juan Fernández, id.—1783, D. Carlos Pulgarin, id.—1784, D. Pantaleón Masivela.—1785, Doña Ana Megía, id.—1786, D. Manuel de Miguel, id.—1787, D.<sup>a</sup> María Masivela, id.—1788, D. José Figueroa, id.—1789, D. José Hernández, id.—1790, D. Ricardo Alfaro, id.—1791, D. Julio Franquelo, id.—1791, D. Mariano Predel, id.—1793, D. Francisco Serrano, id.—1794, D. Miguel Eroles, id.—1795, D. Francisco Moreno, id.—1796, D. Eduardo Lucena, id.—1797, Doña Rosalía Montilla, id.—1798, D. Luis Rodríguez, id.—1799, D. Rafael Sánchez, id.—1800, D. Rafael Gómez, id.—1801, D. Benito Canella, id.—1802, D. José Jiménez, id.—1803, D. Juan Pérez, id.—1804, D. Francisco Pérez, id.—1805, D. José Pérez, id.—1806, D. Luis Pérez, id.—1807, Don Luis Moya, id.—1808, D. Marcial Moreno, id.—1809, D. Jesús Rodríguez, id.—1810, D. Rafael Valera, id.—1811, D. German Muñoz, Murcia, 1812 D. Ramón Bartomeu, Barcelona.—1813, D. Joaquín Casas, Burgos —1814 D. Victor Landeira, Ferrol.—1815, D. Román López, Escombreras, (Murcia).—1816, D. Germán Muñoz, La Unión (Murcia).—D. Victoriano Molina, Pego (Alicante).—Fratán Bonvenon.

*Nia lingvo oficiale akceptita en Hispanujo*—Laŭ reĝa ordono, datumita la 20<sup>a</sup> de Septembro, kaj publikigita per *Gazeta de Madrid*, la 24<sup>a</sup>, oni rajtigis la hispanajn policanojn konantajn fremlandajn lingvojn por uzi specialan insignon. Tiu distingilo konsistas el rubando 15 milimetrojn larĝe, diverjskolora, laŭ la flago de la lando, kiu estos lokata sur maldekstra maniko.

Okaze tiu Reĝa ordono estis petita de la policano Sro Nicanor García Llorente, el Zaragozo, la rajto uzi taŭgan distingilon por la lingvo Esperanto de li posedata; kaj la Ĝenerala Policano Inspektestro rajtigis oficiale la S-ron García por uzi sur la maldekstra maniko Esperantistan insignon, kiu konsistas el verda rubando angula kun blanka pinto sur kiu fariĝas videbla kvinpinta stelo, laŭ la desegnaĵo proponita de la Esperantista Grupo «Frateco», kaj plezure aprobata de Hispana Societo por propagando de Esperanto.

Nian gratulon al la Zaragozaj amikoj kaj al simpatia policano S<sup>o</sup> García Llorente.

*Nova Grupo Esperantista.*—Fondita de S<sup>o</sup> Pascual Martí, klera leŭtenanto de la Ĉivila Gvardio, stariĝis nova Grupo en Pego, malgranda urbo de la provinco Alicante'a. Estu bonvenataj en Esperantujon niaj fervoraj samideanoj.

*Bonfarantoj membroj de H. S.*—Laŭ la 4<sup>a</sup> artikolo de nia Regularo estis proklamitaj «Bonfarantaj membroj» de nia Societo, S-roj Rodrigo Varo, e-

Anglés (Gerono); Manuel Sánchez Rubio, el Almonacid de la Sierra (Zaragoza) kaj Juan Saenz Casero, el Torquemada (Palencia).

La du unuaj sinjoroj, kvankam ili estas tre kleraj kaj bonaj esperantistoj, komencis *perkorespondan kurson* de nia lingvo, laŭ la aparte *Regularo por la Instruado kaj profesorado*, sub la direkto de S-roj Ferdinando Soler Valls kaj Jozefo Garzón Ruiz.

S<sup>o</sup> Rodrigo Varo estas *chiama membro* de nia Societo, ĉar li ankaŭ estas *Divastiganta membro*.

Baldaŭ atingu la superan diplomon niaj fevoraj samideanoj.

---

*Atestoj je Kapableco kaj Profesoraj Diplomoj.*—Por atingi tiuspecajn titolojn la Direktanta Komitato ricevis kelkajn verkojn, kies devizoj estas: «*Ni pasho post pasho, post longa labero, atingos la celon en gloro*». »*Omnia vincit labor*». Ni deziras konigi laŭregulare, la nomojn de niaj estontaj profesoroj, nekonitaj ĝis nun, kaj gratuli ilin je ilia sukceso.

---

Sub la nomo Komerc. Industri-Esperantista Oficistaro la grava Societo «Centre de Dependents del Comers y de la Industria» el Sabadell, la lastan Decembron, fondis Esperantistan sekcion, kies celo estos faciligi al siaj anoj pligrandigadon de ilia kono pri komerco kaj Industrio, uzante por tio Esperanton, kiun samtempe propagandos laŭ sia tuta povo, penante por ke ĝia uzo, kiel eble plej baldaŭ iĝu ordinara en internaciaj komercaj kaj industriaj aferoj. Ĝia elektita estraro estas: Prez.—R. Grampera Garriga; Vic-Prez.—G. Bernardo; Kasisto.—R. Bassol; Bibl arĥivisto.—J. Arcis; Sekr.—P. Oriach Salá.

---

Mahona Grupo Esperantista en sia ĝenerala kunsido solenigita la 22.<sup>an</sup> de januaro 1911<sup>a</sup>, elektis la jenan Direktan Komitanton:

Honoraj Prezidantoj: Sro. Ludoviko Lazaro Zamenhof.—Sro. Josefo Juaneda, Pastro.—La Prezidanto de Scienca Mahona Ateneo.—La Prezidanto de H. S. p. p. Esperanto.

Aktiva Prezidanto.—Sro. Josefo M.<sup>a</sup> Domenech Puigjaner.

Voĉdonantoj: Sro. Antonjo Tuduri Ponsetí.—Sro. Jakobo Sala Gomila.—Sro. Antonjo Fradera Carreté.

Kasisto: Sro. Emanuelo Sintés Rofger.

Sekretario: Sro. Bartolomeo Pons Aragonés.

Arĥivgardanto: Sro. Petro Ripoll Busquets.

---

La Grupo Esperantista de Barakaldo (Vizkajo) nomis prezidanton, Sron. Avelino Trigueros, kaj kasiston, Sron. Vicente Echavandio, Delegito de V. E. A.

---

---

## LA KAPITANO VENENO (1)

(Daŭrigo)

X<sup>a</sup>

## LA KAPITANO DIFINAS SIN MEM

Fraŭlino!... Unue, mi ne havas la kapon malforta, nek iam mi ĝin havis tiel, kaj estas pruvo pri tio, ke ĝi ne povis esti penetrita de kuglo. Due, mi multe bedaŭras, ke vi parolas al mi tiel kompate kaj senenergie; ĉar mi ne komprenas delikataĵojn, flametaĵojn nek dolĉaĵojn. Pardonu la malgentilecon de miaj vortoj, sed ĉiu estas kiel Dio lin kreis, kaj al mi ne plaĉas trompi iun. Mi ne scias pro kia leĝo ol mia naturo mi preferas ke oni pafu kontraŭ mi ol ke oni kuracu al mi bonece!—Mi vin avertas, sekve, ke vi ne flegu min tiel delikate; ĉar tio elkrevigos min sur tiu ĉi lito, al kiu ligis min mia malbona sorto...—Mi ne naskiĝis por ricevi favorojn nek por danki nek pagi ilin; tial, mi ĉiam penis ne interkonsenti kun virinoj, nek infanoj, nek hipokrituloj, nek iu ajn pacoma kaj dolĉema personaro.... Mi estas kruelega homo kiun neniu povis toleri, same kiam juna kiel kiam maljuna, laŭ mi jam komencas esti.—Mi estas nomata, je la tuta Madrido, la *Kapitano Veneno*. Ĝi do, vi povas ekkusi, kaj ordoni, tuj kiam tagiĝos, ke oni transportu min sur portilo en la ĝeneralan Hospitalon.—Mi eldiris!

—Jesuo, kia homo! ekkriis terurigita Donjo Tereso.

—Tiel devus esti ĉiuj! (respondis la Kapitano). Pli bone marŝus la mondo, aŭ ĝi jam estus haltiginta de antaŭ longe.

Dolorumo reridetus.

—Ne ridetu, fraŭlino; ĉar tio estas moki je malfeliĉa malsanulo, nekapabligita forkuri kaj liberigi vin pri sia ĉeesto (daŭrigis diri la vundito, per iom da melankolia akcento). —Troe mi scias, ke mi ŝajnas al vi tre malbone edukita, sed kedu ke mi ne multe bedaŭras tion! Kontraŭe, mi bedaŭrus se mi estimus min estiminda kaj poste vi min kulpigus, ĉar mi vin estus erariginta pri mi! Ho! Se mi captus la malnoblulon, kiu alportis min en ĉi tiun hejmon, nur por enuigi vin kaj min malhonori!...

—Ni alportis vin, peze; mi, la sinjorino kaj la fraŭlino... (elparolis la galicidino, kiun estis vekinta kaj altirinta la voĉo de tiu furiozulo.) La sinjoro estis sangellasiganta antaŭ la pordo, kaj tiam la fraŭlino kondolencis pri vi. Mi ankaŭ kondolencis iom; kaj kiol ankaŭ kondolencis la sinjorino, ŝargis la tri la sinjoron, kiu bone pezas malgraŭ ke li ŝajnas malgrasa.

La Kapitano rekoleriĝis, vidante scene alian virinon, sed la galicidina rakonto impresis lin tiel, ke li nur povis ekkrii:

—Domage, ke vi ne estis farinta tiun-ĉi bonan faraĵon pri viro pli bona ol mi! *Ĝi kial vi bezonis koni la pekan Kapitanon Veneno?*

(1) Vidu la numerojn 6, 7, 8, 10, 11 kaj 12 de GAZETO ANDALUZIA. Ili estos sendata senpage por niaj abonantoj.

Donjo Tereso, rigardis sian filinon, kvazaŭ ŝi volus signifi ke tiu viro estas malpli malbona kaj kruelega ol li kredigas esti, kaj ŝi trovis ke Dolorumo daŭras ridetante ĉarmosprite, kiel signo ke ŝi opinias la samon.

Dume, la plendema galicidino larme diris:

—Ankoraŭ pli da kompato havus la sinjoro se li scius ke la fraŭlino mem iris voki la kuraciston, por ke li kuracu tiujn du kuglovundojn, kaj ke kiam la malfeliĉulino trairis meze de la strato onis pafis kontraŭ ŝi tiel, kiel... miru... ĝi boris al ŝi la jupon.

—Mi neniam estus rakontiinta al vi tion, sinjoro Kapitano, pro timo ke vi koleriĝus... (diris la junilino, duone modesta kaj burleska; tio estas, mallevante la okulojn kaj ridetante pli sprite ol antaŭe. Sed ĉar ĉi tiu, Rozo, preparolas ĉion, mi nur povas nun petegi vin ke vi pardonu al mi la ektimou kaŭzitan de mi al mia patrino, kaj kiu ankoraŭ ŝin febre malsanigas.

La Kapitano estis miregigita, malfermis la buŝon, rigardis alterne Dolorumon, Donjo Tereson kaj la servistinon, kaj kiam la junulino ne parolis, plu, li fermis la okulojn preskaŭ blekegis, kaj ekkriis, levante la pugnojn al la ĉielo:

Ha kruelaj! —Kiel mi sentas la popardon en la vundo! Sekve la tri de cidis ke mi estu via sklavo aŭ via ridindulo!—Sekve, vi deziregas farigi min plori aŭ diri amemajojn!—Sekve, mi estos kondamnata se mi ne liberiĝos! —Tamen, mi liberiĝos!—Nur mankus nun, ke ĉe la fino de miaj jaroj mi venus esti ludilo je la tiraneco de tri bonfaraj virinoj; Sinjorino! (li daŭrigis enfazego, turnante sin al la vidvino.) Se vi tuj ne kuŝigas kaj ne trinkas, poste, tason da tilifloro kaj orangflora tizano, mi alŝiros al mi ĉiujn bandaĝojn kaj ĉifonojn, kaj mi mortigos post kvin minutoj, kvankam Dio ne volus!—Pri vi, fraŭlino Dolorumo, bonvolu voki la noktogardiston kaj diri al li ke li iru ĉe la Markizo de la Timianejoj, strato Sankta Francisko, numero...; kaj sciigu lin, ke lia kuzo, Don Jorgo de Kordobo lin atendas ĉi tie, grave vundita.—Tuj poste, vi ankaŭ kuŝigu, lasante min submetita al ĉi tiu netolerebla galicidino, kiu donos al mi de tempo al tempo sukeritan akvon, sola helpo, kiun mi bezonas ĝis kiam mia kuzo Alvaro venos.—Tie, mi eldiris, via Grafina Moŝto: ekkuŝgu.

La patrio kaj filino okulsignis unu la alian, kaj tiu ŝfable respondis:

—Mi volas doni al vi ekzemplon pri obeo kaj prudento.—Bonan nokton, sinjoro Kapitano; ĝis morgaŭ.

—Mi ankaŭ volas esti obeema... (aldonis Dolorumo, notinte la veran nomon de la *Kapitano Veneno* kaj lia adreson por la hejmo de lia kuzo) Sed, ĉar mi jam ekdormas permesu al mi ke mi lasu ĝis morgaŭ sendi tiun atentan sendaĵon al la sinjoro Markizo de la Timianejoj.—Bonan tagon, sinjoro Don Jorgo; ĝis poste —Zorgu ke vi ne movu vin!

—Mi ne restos sola kun tiu sinjoro! (kriis la galicidino). Lia diabla genio levas miajn harojn kvazaŭ ili estus pintoj, kaj tremigas min kiel cervidinon.

Trankviliĝu, mia bela... (respondis la Kapitano), ĉar pri vi mi estos pli dolĉa kaj afabla ol pri via mastrino.

Donjo Tereso kaj Dolorumo nepre ekridegis, aŭdante tiun unuan bonhumoran eldiron de sia neelportebla gasto.

Kaj ni vidu, pro kia arto kaj modo, tiel funebraj kaj tragediaj scenoj kiel tiuj de la vespero kaj nokto, havis kvazaŭ fino kaj kronado, iom da ĝojeco kaj gajeco. — Tiel certe rezultas ke en a mondo ĉio estas mallongedaŭra kaj momenta, same la feliĉeco kiel la doloro; aŭ, pli bone dirate, ke de tegoloj malsupren ekzistas nek bono nek malbonaĵo kiu daŭras unu jarcenton.

(Daurigota.)

## BIBLIOGRAFIO

*En tiu-chi fako ni chiam raportos pri eldonajhoj donace ricevitaĵ che la Redakcio; sed tiu raporto estos tute ampleksa, se ili alvenas po du ekzemple roj de chiu verko: tiam ghi estos plenumata de nia atestimata kunlaboranto S<sup>o</sup> Vicente Inglaad Ors, el la Lingva Komitato.*

*La Inicilo matematika.* — En bona gimnaziejo oni devas fortikigi ĉiujn membrojn, por ke ili fariĝu fortika kaj gracia. En bona lernejo, kvazaŭ gimnaziejo de l'penso, oni devas fortikigi ĉiujn intelektajn fakultatojn, samtempe kia oni ni instruas la sciencan.

Lernigi parkere lecionojn estas tiel malutila ol fortikigi nur dekstran brakon; tiam niere ni fariĝos monstraj, sed ne fortikaj. Krom tio, dum memoro laboradas, penso malatentas, kaj la klopodo estos tre granda por atingi tre malgrandan sukceson. Kontraŭe, se ni disdonas laboron ĉe intelektaj fakultatoj, ni malpriaciĝas kaj pli sukcesas; la studado, aŭstataŭ tede estas amuza, la lernantoj deziras lerni novajn sciojn, kiuj naskas en ili novajn scivolemojn.

Pro tio, multaj profesoroj lernigas lingvojn per videblaj aferoj (Metodoj Delmas, Berlitz, k. c.). kunigante la klopodojn de la memoro kaj de la vido; sed, ĉu tio estas ĉiam farebla? Kiel lernigi, ekzemple, matematikon.

Sinjoro jako Camescasses elpensis manieron lernigi matematikon, kunigante klopodojn de l'memoro, de l'penso kaj de l'vido, per malmultkosta ludilo, simpla, vere internacia en siaj elementoj, kiel ĉia kara lingvo. Ĝi konsistas el kesteto, enhavanta: 200 kubetojn, blankajn kaj ruĝajn, 144 vergetoj kaj unu noton, kompreneble Esperante verkitan. Ĉiu kubeto estas centmetro kuba, havante du fendetojn, kiuj kruciĝas oktangule, por ke oni povu fiksi per ŝtalaj vergetoj la kunigon de kubetaro. Nenion plie havas la kesteto kaj per tiuj du elementoj, kubetoj kaj vergetoj, oni povas la jenon:

1.<sup>o</sup> — Fari mozaikojn, desegnaĵojn, literojn, k. t. p.; ĉar estas kubetoj laŭ du malsamaj koloroj. Tion nomas nia samideano S.<sup>o</sup> Camescasse, patrina edukado.

2.<sup>o</sup> — Lerni Dekunan nombradon, ĉar la lernanto prenas unue dek kubetojn, per ili kaj vergeto konstruas unu kubetaron kaj du vergetojn faras mozaikon centkuban, per dek mozaikoj, unu sur la aliaj, li konstruas kubon.

3.<sup>o</sup> — Fari ĉiujn matematikajn operaciojn. Kiamaniere? Legu la Noton,



kaj vi trovos la pruvon por  $(a+b)^2 = a^2 + 2ab + b^2$ ; tiun de  $1+2+3...+n = \frac{n(n+1)}{2}$ , k. c.

4.° — Lerni Metran Sistemon.

Pro timo, ke mi eble trouzas la bonecon de nia direktanto, mi finas tiun ĉi malgrandan recenzon dirante pri la Inicilo, ke ĝi estas «Filosofia ŝtono» de la matematika scienco; la sola maniero por igi simpatian ĉian studon. Tio, kion mi bedaŭras estas ke mi naskiĝis tiel frue, kiel por ne profiti tian elpensajon dum mia knabeco. — FERNANDO REDONDO.

*Sesa Universala Kongreso de Esperanto*. — Ni vicevis el Esperantista Oficejo 72 — paĝan broĉuron laŭ grandampla formato, zorge presita kaj eldonita. Ĝi estas unu el utilegaj Esperantistaj dokumentoj pri la Oficialaj historiaj, bibliografiaj kaj statistikaj aferoj de la nomita Oficejo; kaj enhavas plenan kaj detalan raporton pri la Washingtona Kongreso, okazinta la 14—20 an de la juspasinta Aŭgusto: Malferna parolado de D.° Zamenhof, Protokolo, de la kunsido de la Lingva Komitato, Oficiala protokolaro de la ĝeneralaj kunsidoj Aldenoj al la protokolaro, Nomaro de la Kongresanoj kaj Kunvenoj de specialistoj. Prezo: 1 fr.

**Internacia Medicino.** — Pro ĝia praktika, ankaŭ por la nekuracisto & por la ne esperantisto tuj ekkoneble praktika valoro ĉi tiu ĵurnalo efektive estas tre taŭga propagandilo, precipe inter kleruloj.

La eldonejo do ofertas ĝin al grupoj (nur al grupoj) mendontaj & pagontaj ĝin dum 15 tagoj post la akcepto de ĉi tiu ĉirclero por nur 1 (unu) Sm. anstataŭ 3 Sm., t. e. niaj forsed-ktp.-kostoj, la tutan jarkolekton, tamen nur en unu ekzemplero.

Samtempe bonvolu denove rekomendi niajn aliajn eldonaĵojn:

**INTERNACIA SCIENCIA REVUO**, fame konata nun eliranta la 8-an jaron ĵurnalo; jare nur 2 Sm. 750 s.

**ANTI-ALKOHOLISTO INTERNACIA**, monata komence malgranda internacia ĵurnalo, redaktata de D-ro J. Hanauer, Bruxelles. Jarabono: 1 Sm.

Specimenojn de ĉiuj niaj eldonaĵoj ni «principe» nur sendos kontraŭ respond-kupono aŭ poŝtmarkoj.

Por efike atentigi ĉiujn kuracistojn je niaj novaj ĵurnaloj, precipe je **Internacia Medicino** & por eble *aligi la kuracistojn al la Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio*. — «TEKA», — ni insiste petas niajn amikojn, grupojn ktp. ĉie en la mondo, bonvole sendu al ni nomaron de kuracistoj en via urbo esperantemaj.

Fine ni deziras atentigi vin, ke nia **Internacia Medicino** same kiel niaj ĉiujare eldonitaj **TEKA-ĵarlibroj** estas la plej taŭgaj organoj por reklam-anonci preparaĵojn ktp. koncernantajn la internacian kuracistaron.

**H. F. ADOLF THALWITZER**

ELDONEJO. — Kötzschenbroda-Dresden (Germ.)

---

# Hispana Societo

POR PROPAGANDO DE ESPERANTO

---

**San Juan, 48 y 50.-Burgos.**

Prezidanto: S.<sup>o</sup> Emanuelo Esteban Saenz.

Sekretario: S.<sup>o</sup> Carlos Duquesnay.

Petu la JARLIBRON, publikigitan de ĝi, por 1910<sup>a</sup>, enhavantan la Regularon por la Societo, tiun por la profesorado kaj instruado de Esperanto, tiun por la Konstanta Komitato, Nomarojn, kaj kvinlingvan Vortareton. Senpage por la Societanoj.

## **JARA KOTIZAJHO: 1 Peseto.**

Kun abono al GAZETO HISPANA, propraĵo de la Societo, 3<sup>o</sup>50 pesetoj.<sup>a</sup>

---

**Kolektistoj!**—Mi akceptas poŝtmarkojn el ĉiuj landoj, interŝanĝe kun tiuj de Hispanujo.—Ĉiam kaj nepre mi respondos per revenonta poŝto.—**Adreso:** Emanuelo Soto.—Murillo, 24.—San Fernando. (Cádiz).

---

**AL ĈIUJ ESPERANTISTOJ.**—Por fondi ĉi-tie Esperantan Oficejon, enhavantan ĉiuspecajn Esperantaĵojn mi petegas al la samideanaro, precipe al la libroj kaj Esperantaj firmoj, ke ili helpu min, sendante al mi gazetojn, prezarojn kaj aliajn propagandilojn.—**Adreso:** Heriberto Diaz López. = Deleg. de U. E.-A.—Strato X, núm. 5.—Sta. Cruz de Tenerife (Kanariaj Insuloj).

---

*Presejo La Unión. — Placo Fernández Fontecha, num. 4.—Cádiz.*

# POŝVORTARO


## Indispensable al Esperantista

Diccionario de bolsillo ESPAÑOL-ESPERANTO y ESPERANTO-ESPAÑOL, con más de **10.000 raíces**, prefijos y subfijos de los usados vulgarmente, subfijos técnicos y terminaciones gramaticales, por

**ANTONIO TUBURI**

Precio: seis reales en rústica; 2 ptas. lujosamente encuadernado.

BENGOCHEA, 3.--SAN SEBASTIÁN



## Insignias Esperantistas

MODELO «ĈEFEC»  
VARIADÍSIMA COLECCIÓN

Estrellas esmaltadas en color verde, sola (1-2) sobre fondo oro, con la inscripción «Esperanto lingvo internacia», en una orla de esmalte negro (3), ó sobre fondo blanco de esmalte (4).

### PRECIOS POR CORRESPONDENCIA

Representante para Andalucía: JOSE GARZON RUIZ.—Muñoz Torrero, 10.—San Fernando (Cádiz).

Representante general en España: MANUEL DE LA FUENTE.—Conde del Asalto, 143, 1.º—Barcelona.

**TODO EL ESPERANTO** y el modo de aprenderlo, leyendo una pequeña historia, por Ĉefec.

**Pequeño folleto: 0'10 pta.**

Representante para Andalucía: JOSE GARZON RUIZ.—Muñoz Torrero, 10.—San Fernando (Cádiz).

# Hispana Societo

## POR PROPAGANDO DE ESPERANTO

**San Juan, 48 y 50.-Burgos.**

Prezidanto: S.<sup>o</sup> Emanuelo Esteban Saenz.

Sekretario: S.<sup>o</sup> Carlos Duquesnay.

Petu la JARLIBRON, publikigitan de ĝi, por 1910<sup>a</sup>, enhavantan la Regularon por la Societo, tiun por la profesoraro kaj instruado de Esperanto, tiun por la Konstanta Komitato, Nomarojn, kaj kvinlingvan Vortareton. Senpage por la Societanoj.

**JARA KOTIZAJHO: 1 peseto.**

Kun abono al GAZETO HISPANA, propaĵo de la Societo, 3'50 pesetoj.

## “LA MALGRANDAJ INDUSTRIOJ”

2.<sup>a</sup> AGUADA---(CADIZ)

Fabriko de fluidaj koloroj por industrioj; ellaboritaj per plej puraj materialoj, kaj je malalta prezo.

Oni preparas la sekvantajn kolorojn:

«Ideala» (zinka), Boneĝa (albajada), Ferrilina (feroksida), Griza, Alka, Okra, Nigra, Blua, Verda, k. e.

Oni vendas ilin, po galonoj, de malsamaj pezoj, laŭ la koloro.

— Estas precipe rekomendinda la nomita **Ferrilina**, pro tio ke ĝi taŭgas por fisakpentraĵo sur fero, kalkoŝtono kaj ligno; kaj pro sia belega koloro. Ĝi kovras duoble ol minio, kaj kostas malmulte; rezultante po kvarono de ĝia valoro.

Ne konfuzu ĝin kun la ruĝteroj.

**Antisepsa sapo** de Dro. Gallego.—Plej bona el ĉiuj nunkonataj antisepzajoj pro sia utileco, ŝpareco kaj senriskeco. Ĝenerala tenejo de l'aŭtoro, SAN FERNANDO (Cádiz).—Prezo: 0'75 pts., ĉiu peceto.